

## Esperanto en foiro Horizon

**Germana Esperanto-Asocio (GEA) celas, en la jubilea jaro plifortigi la varbadon. Por tio Martin Schäffer malkovris la foirojn Horizon, kiuj okazas en pluraj grandaj urboj, februare kaj marte en Münster respektive Stuttgart. Ties lokaj grupoj preparis do informstandon. Jen unua raporto pri la sperto en Münster.**

### Kio estas Horizon?

La foiro Horizon estas por estontaj kaj freŝaj abiturientoj, kiuj volas informiĝi pri ebla profesia kariero. Kiel informantoj do partoprenas grandaj firmaoj kaj altlernejoj, sed ankaŭ kelkaj senprofitcelaj instancoj kun reduktitaj foir-kotizoj. Unuavide Esperanto apenaŭ konformis al tiu kadro, sed la Münster-anoj varbis per klarigo: Jen io, kion vi ne devas, sed rajtas lerni. Valoris la fakto, ke regule okazas Esperanto-kurso en la universitato de Münster kiel ero por bakalaŭriga studo. Krome, ke planlingvoj estas temo en ĝenerala lingviko kaj taŭgas por estontaj filologoj kaj lingvistoj. Tio vekis certajn miron kaj intereson.

Kvankam la foiro do turnis sin al junuloj, montriĝis, ke ilin amase akompanis la gepatroj. Tial la foiro peris al GEA niajn du plej gravajn celgrupojn, nome inteligentajn, interesatajn junulojn kaj ties same progresemajn gepatrojn. Kurioze la unua informpetanto estis ĉefeŭtenanto de la najbara informstando de Bundeswehr.

### La informstando kaj la informantoj

La informstando estis nur malgranda, nome 2 x 2 metrojn, sed tio sufiĉis. Du grandaj sloganbendoj je unua vido informis la homojn, pri kio temis. Do, nur interesatoj aliris la standon. Estis malpermesite, varbi en

la koridoro. Servis sabate kaj dimanĉe po ses horojn Gunnar Fischer kaj Janot van der Kolk. La lasta estas nova Esperantisto studento, membro de Germana Esperanto-Junularo (GEJ). En la malantaŭo sidis Rudolf Fischer, kiun oni foje bezonis por fakaj informoj, precipe por la pliaĝuloj. Sekve ambaŭ celgrupoj trovis siajn samaĝajn informantojn.

### Klientaro kaj ties intereso

Dum la junuloj ofte eĉ ne sciis, kio estas Esperanto, la gepatroj kutime esprimis sian miron, ke Esperanto ankoraŭ ne malaperis kaj ĝojis pri tio. Foje oni aŭdis iun supraĵan antaŭjuĝon („Tion ja neniu parolas“) de preterpasanto. Des pli ĝojiga la fakto, ke ĝuste tre inteligentaj kaj progresemaj interesatoj aliris la standon, ofte sciante jam plurajn fremdlingvojn. Ilin fascinis la „interna ideo“, spertebla kontrasto al la cetera foiro, kiun superregis ekonomio kun Angla-lingva supraĵo (jam per la nomo Horizon). Jen, kion elstarigu nia reklamo. Batalo kontraŭ la Angla kaj „fina venko“ ne trovas intereson, sed sloganoj kiel „renkontu aliajn kulturojn“, „sentu vin ano de la homaro“ kaj „Esperanto estas ŝlosilo al tio“ konvinkis ĝuste tiujn, kiujn ni ŝatus havi en la movado.

### Kritika retrorigardo al elspezoj kaj rezultoj

GEA entute elspezis ĉ. 500 eŭrojn por unu stando. Ĉu valoris? La Münster-anoj disdonis 57 ekzemplerojn de aktuala flugfolio, kiu informas pri la jubilea agado (vidu Esperanto aktuell 2012/2, p. 11). Tio signifas, ke okazis minimume tiom da informdialogoj. Pli multaj vizitantoj kunportis la konatajn faldfoliojn, kiuj denove montriĝis ege utilaj ([www.esperanto.de/deb/werbematerial/](http://www.esperanto.de/deb/werbematerial/)). Kompreneble ĉiuj preterpasantoj krome vidis, ke Esperanto ankoraŭ ekzistas kaj




**Bildo:** Gunnar Fischer (3a de maldekstre) kaj Janot van der Kolk (4a de maldekstre) informas patron, filon kaj ties amikojn.  
**Fotis:** Rudolf Fischer

# Portugalaj lernejoj ĉe la Printempa Semajno Internacia

La unuan fojon grupo da lernejoj el sud-Eŭropo aliĝis al la Printempa Semajno Internacia (PSI), kiu okazis komence de aprilo en Bonn. *Esperanto aktuell* jam en marto iom intervjuis la instruiston, kiel ekiĝis tiu bonvenigenda novaĵo.

**M**ia nomo estas Luis Ladeira. Mi venos kun kvar knaboj kaj ses knabinoj inter 14 kaj 17 jarojn aĝaj, akompanos nin mia koleginino Helena Spencer, kiu ĵus komencis lerni Esperanton.



Ni ĉiuj loĝas apud Lisbono, en la proksimaj urbetoj Potinha kaj Amadora. En 2004 mi komencis instrui Esperanton – kaj eklernis samtempe. Niaj lernejoj ĉiuj devas studi la Anglan, Esperanto estas nedeviga kurso kun nur unu horo semajne. Ĉar kelkaj junuloj eklernis Esperanton maljam ĉi-jare, la lingva nivelo estas ankoraŭ malalta.

Mi estas la sola en la grupo, kiu jam iom konas Gemanujon. Mi estis jam en Berlino kaj en okcidento, ekzemple ĝuste ankaŭ en Bonn. Lastjare mi partoprenis en la aranĝo Fringoj, en Franca kulturdomo de Esperanto en



Grésillon, sed mi ŝatas, iri ĉiujare al aliaj Esperanto-renkontiĝoj. PSI ŝajnis al mi tre oportuna, ankaŭ por veturigi miajn lernejojn.

Finance ni profitas de nia partopreno en EU-projekto Comenius, kadre de kiu ni kunlaboris kun Italoj kaj Hispanoj. Fakte tial la tuta restado kaj ankaŭ la flugo al Köln-Bonn estas por ni senpagaj. Tiel ankaŭ Esperanto spertas subtenon de Eŭropa Unio.

Kompilis el skriba intervjuo  
**Rudolf Fischer**

▶▶ troveblas. La anoncitaj du prelegoj tamen apenaŭ trovis publikon, eble ili estas superflujaj. Laŭ la juĝo de la tri Münster-anoj valoris la partopreno.

## Estontaj foiroj Horizon, kiuj lokaj grupoj pretas aktivi?

Horizon okazadas ĉiujare en multaj grandaj urboj, ĉi-jare ankoraŭ en Stuttgart, Bremen, Friedrichshafen, Freiburg, Potsdam, Essen, Leipzig, Mannheim, Regensburg, Augsburg kaj Mainz. GEA pretas pagi 2-3 partoprenojn jare. Kiuj lokaj grupoj aŭ solaj aktivuloj, precipe de GEJ, povus organizi informstandon? Mi volonte donos konsilojn. Estis malmulta laboro kaj agrabla tasko, la organizantoj de Horizon tre bonvenigas nian partoprenon kaj sperte kaj afable helpis.

## Merkel ein Signal geben

**Im Rahmen des Zukunftsdialogs der Bundeskanzlerin kann man einen Vorschlag "Esperanto fördern" unterstützen. Dazu muss man nicht einmal seine Netzpostadresse, sondern nur (zur Abwehr von Robotprogrammen) einen Sicherungskode (sog. Captcha) abtippen und eingeben.**

**I**nteressant ist, dass Esperanto auch in zwei Vorschlägen erwähnt wird, die wohl von Leuten außerhalb der Esperanto-Bewegung stammen: "Eine Euro-Sprache für alle" und "Stark durch Kommunikation! Bessere Sprachausbildung". Man findet alle drei Vorschläge, wenn man auf der Seite [https://](https://www.dialog-ueber-deutschland.de/)



[www.dialog-ueber-deutschland.de/](http://www.dialog-ueber-deutschland.de/) das Suchwort "Esperanto" eingibt.

**Ulrich Matthias**

[https://www.dialog-ueber-deutschland.de/DE/20-Vorschlaege/30-Wie-Lernen/Einzelansicht/vorschlaege\\_einzelansicht\\_node.html?cms\\_idIdea=13650](https://www.dialog-ueber-deutschland.de/DE/20-Vorschlaege/30-Wie-Lernen/Einzelansicht/vorschlaege_einzelansicht_node.html?cms_idIdea=13650)